# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago №2 Februaro, 2013

**№ 99**

*Kara Leganto, ni varme invitas vin al nia bulteno dum tiu frosta vintra tempo! Ni ankaŭ kore salutas nian estimatan S-ron Prezidanton okaze de lia reveno hejmen post kelkmonata foresto. En ĉi numero vi trovos: informon pri ciferigitaj paĝoj de kelkaj malnovaj E-periodaĵoj; inviton partopreni kelkajn E-aranĝoj. La sekvanta, Marta n-ro estos 100-a, kiu aperis seninterrompe monate dum pli ol 8 jaroj. Agrablan legadon!* –La Redakcio


## Historiaj Notoj pri Esperanto en Ŝikago

Antaŭ nelonge mi vizitis retejon de "Libera Folio", de kie mi ĉerpas interesan kaj utilan informon por nia bulteno. Ĉi foje min ege surprizigis artikoleto de mag. Bernhard Tuider, kiu sciigis, ke "Aŭstria Nacia Biblioteko (ANB) daŭre enretigas historiajn Esperanto-revuojn, kaj jam 25 el ili estas libere atingeblaj en la retejo de la Kolekto por Planlingvoj. Jam de pluraj jaroj la Kolekto por Planlingvoj kaj Esperanto-muzeo de la ANB enretigas skanitajn malnovajn E-gazetojn por faciligi la aliron al tiuj historiaj fontoj. Sekve jam 25 diversaj gazetoj estas senpage legeblaj pere de la retejo de Esperanto-muzeo. Oni ne devas ie registriĝi, sed nur alklaki la ligilon de la dezirata gazeto kaj tuj oni povas foliumi kaj legi ĝin. La plej malnova gazeto estas la unua numero de "La Esperantisto" el la jaro 1889, la plej nova gazeto estas la sesa numero de "Esperanto. Internacia Revuo eldonata de Universala Esperanto-Asocio" el la jaro 1946. En 2013 sep pliaj gazetoj estis aldonitaj:

– L' Amerika Esperantisto (1906-31)
– Kataluna Esperantisto (1910-36)
– La Langue Auxiliaire (1898-1914)
– International Language (1924-31)
– La Revuo Orienta (1920-40)
– Belga Esperantisto (1908-40)
– Verda Mondo (1925-1935)


La tuta listo de la skanitaj gazetoj estas rigardebla, kiam oni alklakas la ligilon "skanitaj revuoj" en la retejo de la Esperanto-muzeo. Pli rapida eblo atingi la liston estas ĉe: http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/19056.htm. Indas regule viziti la liston, ĉar daŭre aldoniĝas novaj skanitaj gazetoj!"

Mi tuj ekis por ekvidi unuajn numerojn de L' Amerika Esperantisto (Amerika Esperantisto post 1907) kaj trovis multe da interesaĵoj. En la 2-a n-ro (Nov. 1906) iu s-ro Nesciulo skribis leteron al la redakcio el Ŝikago (jes, mi ne eraris, la unua litero estas "ŝo", kiun nia E-societo akceptis en la fora 2004 por la nomo de La Societo, poste ĝi aperies en emblemo). Komence de 1907 la redakcio translokiĝis de Oklahomo al... nia urbo kaj redaktoro, Arturo Baker, skribis: "*This number of Esperantist greets you, after long delay, from Chicago. A detailed explanation of all the causes of the*


Vol. I. October, 1906 No. I.

L'AMERIKA ESPERANTISTO

Oklahoma City, U. S. A.


Volume 1 FEBRUARY, 1907 Number 5

AMERIKA ESPERANTISTO

(AMERICAN ESPERANTIST)

A Monthly Journal of ESPERANTO the International Language

CHICAGO, U. Ŝ. A.

*delay would be a recital too long for publication. Chief among them is the rapid growth of the movement for Esperanto, which has piled an enormous load of gratuitous labor upon the workers – I have frequently received as high as four or five hundred letters a week, and sometimes that many in a single day. Second, the lack of Esperanto printing facilities. This last has now been overcome, and this paragraph is set in our own type, still warm from the foundry. Our Esperanto textbook will, we expect, be ready about June 15th... The journal is reduced in size to facilitate "catching up" with the calendar, and will soon be enlarged... do you feel like writing me a letter about your troubles? Think twice, and then use a postal card, with large characters. I'm working fourteen hours per day, as it is. – La Redaktoro*"

La sama n-ro donas adreson de la redakcio: "American Esperantist Company, 1239 Michigan Boulevard, Chicago, U.S.A". Ĉu tiu domo konserviĝis?

De Julia n-ro (6) teksto fariĝis dulingva – angla kaj E-a, en artikolo "Progresado de Esperanto" oni menciis, ke "La Universitato de Ĉikago havas klubon kun cent membroj, inter ili kelkaj profesoroj". En la sama n-ro estis aperigita poemo de John Lekberg el Ĉikago:

NIA LANDO

Ĉu troviĝas la homujo
Kies ĉirkaŭvasta rondo
Estos tiu de la mondo?
Kio estas la respondo?
Certe, Esperantistujo.

Tra la urboj kaj kamparo
En ĉi tiu lando dia
Sonos lingvo sennacia,
Kiu tamen estos nia,
Lingvo por la tuthomaro.
Tie revoj de l' saĝuloj
El la tuta estinteco
Estos bela realeco
En proksima estonteco
Por la veraj homamuloj.

Eble la miljaro venu
Baldaŭtiel a la tero
Faktigota la espero,
Ke la belo kaj la vero
Regu ĉie kaj nin benu.

Ĉar ĉi tiu nova "ujo"
Havas spacon por alia,
Por la via, por la mia,
Kaj por ĉiuj, kaj por ia,
Ĉies vere grandpatrujo. ☞

Fine de la sama n-ro oni informas pri la lastaj eldonaĵoj, inter ili: The American Esperanto Book (316 p., tole bindita, prezo $1.00), Elements of Esperanto (kun Zamenhof'a rakonto "La Feino", 5 cendoj), Poŝtkarto Gramatika (unu, 2 cendoj; dek, 10 cendoj; cente, 50 cendoj). Ĉu prezoj plaĉis al vi?

Mi rekomendas viziti retejon de ANB! *–Araneo*

## La Franca Esperanto-Kastelo Greziljono invitas al:

Staĝo **Printempas** kun intensivaj kursoj, internaciaj ker-ekzamenoj, seminario pri inturkultura komunikado 20a de aprilo ĝis 1a de majo 2013;

Laŭtema **Somera** programo: turisma semajno kun tuttagaj ekskursoj + art-amatora semajno + alternativa MOJOSejo; festa semajno por infanoj kaj familioj + teatra aktora semajno – 6a de julio ĝis 17a de aŭgusto 2013.

Kontakto: kastelo@gresillon.org kaj www.gresillon.org



## Nitobe-Simpozio en Rejkjaviko

La Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (Roterdamo, Nederlando) organizas de tempo al tempo por invititaj gastoj internaciajn simpoziojn pri aspektoj de lingvouzado kaj lingvopolitiko. Tiuj aranĝoj (nomataj Nitobe-simpozioj laŭ la konata japana funkciulo asociita kun la Ligo de Nacioj en la 1920aj jaroj) lastfoje okazis en Tokio (2007) pri la temo "Al justa lingvopolitiko en Azio." Ni planas organizi Nitobe-Simpozion en Rejkjaviko en julio 2013 kun la temo "Lingvoj kaj internaciigo en supera edukado: Ideologioj, praktikoj, alternativoj." La simpozio komenciĝos en la vespero de ĵaŭdo, 18 julio, kaj finiĝos en la frua posttagmezo de sabato, 20 julio, 2013. Partopreno en la simpozio estas laŭ invito. Bonvolu kontakti Humphrey Tonkin ĉe tonkin@hartford.edu por ricevi pliajn informojn.

*En 2013 ankaŭ okazos la 98a Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko*



### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktoro Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org

### Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Anonimulo
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Gertrude Novak, MD
Kasisto – Karlo Gunn

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: $40 jare;
Familia membro: $30,
Regula: $20
Studento aŭ pensiulo: $10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,
Charles Gunn
828 S. Ada St,
Chicago IL 60607-4105

### KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**
**Kunvenoj komenciĝas**
**je 7 p.t. en la Suda**
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

26an de Februaro – Prezidanta horo

26an de Marto – temo estos anoncata